

# 77-a KONGRESO DE IKUE

**kun pilgrimo al Mariazell**
**25.7.-1.8.2026**
**Graz, Aŭstrio**

**Temo:**
**"Sinjoro, donu al mi veran kredon, firman esperon kaj senkondiĉan amon".**
*(Sankta Francisko)*




La jaro 2026 estas jubilea jaro proklamita okaze de la 800-jara datreveno de la morto de Sankta Francisko (1181–1226). Proklamante la jaron, Papo Leono la 14-a memorigis, ke rigardante al nia epoko „markita de tiom da militoj, kiuj ŝajnas senfinaj” kaj „de internaj kaj sociaj dividoj, kiuj kreas malfidon kaj timon”, Kristo „daŭre parolas”, ne ĉar Li proponas „teknikajn solvojn”, sed ĉar “Lia vivo montras la veran fonton de paco”. „Paco kun Dio, paco inter homoj kaj kun la kreitaĵo estas ne-disigeblaj dimensioj de vokiĝo al la universala repaciĝo. La ekzemplo kaj spirita heredaĵo de ĉi tiu Sanktulo, forta en kredo, firma en espero kaj arda en fervora karitato al la proksimulo, estu instigo por ĉiuj kompreni la gravecon kredi je la Sinjoro, dediĉi sin al vivo fidela al la Evangelio, kaj akcepti kaj lumigi per kredo kaj preĝo ĉiun situacion kaj agon de la vivo“ substrekas la Papo instigante ĉiujn fidelulojn aktive partopreni en ĉi tiu Jubileo. „Brila ekzemplo de Sankta Francisko, kiu sciis fariĝi malriĉa kaj humila por esti vera *alter Christus* sur la tero, inspiru niajn korojn vivi en aŭtentika kristana amo al la proksimulo kaj kun sinceraj deziroj por harmonio kaj paco inter la popoloj“.

Sekvante la spurojn de la Malriĉulo el Asizo ni transformu la esperon, kiu igis nin pilgrimantoj dum la Sankta Jaro 2025, en fervoron kaj entuziasmon de aktiva karitato. Ĉi tiu Jaro de Sankta Francisko estu por ĉiu el ni providenca ŝanco por sanktigo kaj evangelia atesto en la nuntempa mondo, por la gloro de Dio kaj por la bono de la tuta Eklezio.

Do, ĉi tio estas invito ankaŭ por ni katolikaj esperantistoj, ne nur celebri la jaron, sed ankaŭ pri-pensi kaj denove malkovri tion, kio estas esenca: *kredon kiu fortigas nin kaj gvidas tra defioj; esperon kiu levas nin kaj malfermas la rigardon al la estonteco; amon kiu superas limojn kaj diferencojn kiel la plej valora donaco kapabla plifortigi niajn rilatojn, komunecon kaj agadon.*

En tiu spirito kun dankemo ni rememoras la valoran kontribuon de esperantistoj franciskanoj, kiuj per sia laboro kaj sindediĉo helpis disvastigi Esperanton. Ilia agado montras kiel la franciskana idealo povas konkrete vivi en la moderna mondo, ankaŭ per internacia komunikado kaj komuna serĉado de bono.

Kaj fine, sed ne malpli grave: post 105 jaroj IKUE revenas al Graz! Jes, Graz gastigis la 7-an Kongreson de IKUE. La ĉi-jara Kongreso de IKUE estos la 5-a en Aŭstrio. Post la 7-a, du postaj la 9-a (1924) kaj la 27-a (1959) okazis en Vieno kaj la 33-a (1970) en Klagenfurt.

*Bonvenon!*

## LA KONGRESURBO

Graz estas la dua plej granda urbo en Austrio kaj la ĉefurbo de la federacia lando Stirio. Pli da informoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Graz.

Ankaŭ ni rekomendas, ke vi vizitu la retejon de la 111-a UK, kie troveblas la Unua bulteno kun la prezento de la urbo https://uk.esperanto.net/2026/unuabulteno kaj la Dua bulteno kun pli da informoj pri Aŭstrio, Graz kaj kiel plej facile atingi la kongresan urbon:

https://uk.esperanto.net/2026/duabulteno (p. 5-8).

## KONGRESAJ PROGRAMEROJ

- ĉiutagaj komunaj preĝoj: matenaj kaj vesperaj, rozario
- ĉiutaga sankta meso
- laborkunvenoj de IKUE
- intensa seminario lige al la temo de la kongreso
- prelegoj
- piedaj pilgrimoj: al la katedralo de Graz, al la franciskana preĝejo
- tuttaga busa pilgrimo: Sanktejo Mariazell v. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mariazell
- urba trarigardo

***Ĉiuj programeroj kiuj okazos en la kongresejo aŭ dum la pilgrimoj en la preĝejoj estos hibridaj kaj oni povos sekvi ilin per ZOOM.***



Katedralo de Graz





Franciskana preĝejo Maria La Helpantino




ZEO en Graz





Bazililiko en Mariazell

## ALIĜKOTIZOJ

| ALIĜKATEGORIO / LIMDATO | Ĝis 30.5. | | Ĝis 10.7. | | Ekde 11.7. | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | A | B | A | B | A | B |
| IKUE-membro | 40 € | 25 € | 50 € | 30 € | 60 € | 35 € |
| ne IKUE-membro | 55 € | 30 € | 65 € | 35 € | 75 € | 40 € |
| junulo/familiano/akompananto de handikapulo: IKUE-membro | 25 € | 15 € | 30 € | 20 € | 35 € | 25 € |
| junulo/familiano/akompananto de handikapulo: IKUE-membro | 30 € | 20 € | 35 € | 25 € | 40 € | 30 € |
| infanoj malpli ol 12 j. | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| virtuala partopreno IKUE | 15 € | 10 € | 20 € | 15 € | 25 € | 20 € |
| virtuala partopreno ne IKUE membro | 20 € | 15 € | 30 € | 20 € | 35 € | 25 € |

**Taga parta partopreno** A-landoj: 20,00 € B-landoj: 10,00 €

**A: landoj de Okcidenta Eŭropo, Kanado, Usono, Izraelo, Japanio, S. Koreio, Oceanio, transmaraj teritorioj de Francio**

**B: ĉiuj aliaj landoj**

## KOMPLETA KONGRESA SERVO

**La kompleta kongresa servo inkluzivas servojn por la tuta kongresa semajno:**

- loĝigon en la elektita ĉambrotipo (!*Ĉambroj ne estas klimatizitaj.)*
- manĝadon kun tri manĝoj (matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo en bufeda formo) de lundo matene ĝis vendredo vespere (dum la semajnfino estas ofertataj matenmanĝo kaj vespermanĝo)
- dimanĉan tagmanĝon en ekstera restoracio
- semajnan purigadon de la ĉambro
- uzon de komunaj spacoj: kapelo, ekipita kuirejo, gimnastikejo, ripozĉambro, kafejo
- senpagan retaliron
- unufojan provizon de lito- kaj mantukoj por la daŭro de la restado
- tuttagan busan pilgrimon al Mariazell

▶ **Ne eblas parta (kelktaga) mendo de la loĝigo kaj manĝado.**

▶ **Kolpinghaus ne disponeblas pri la aŭtaj parkejoj, sed oni povas provi en ĉirkaŭaĵo pagendajn subterajn parkejojn. Se vi bezonas konsilon, skribu al la organizantoj!**

▶ **Kongresanoj kiuj ne mendas kompletan kongresan servon pagante nur la kongres-kotizon rajtas partopreni oficialan kongresan programon, sen uzo de aliaj komunaj spacoj (ekipita kuirejo, gimnastikejo, ripozĉambro).**
**Krome, ili povas mendi la dimanĉan tagmanĝon 25,00 € kaj tuttagan pilgrimon al Mariazell 45,00 €.**

| Tipo de la ĉambro (prezoj por unu persono inkluzivas: tranoktadon, manĝojn, tuttagan pilgrimon al Mariazell) | A-landoj | B-landoj |
|---|---|---|
| Loko en 2-lita ĉambro (komunaj banejo kaj necesejo)* | 340,00 € | 290,00 € |
| Loko en 1-lita ĉambro (komunaj banejo kaj necesejo) | 380,00 € | 310,00 € |
| Loko en 1-lita ĉambro (kun propra banejo kaj necesejo) | 410,00 € | |
| Loko en apartamento (kun propra banejo, necesejo kaj kuirangulo) | 450,00 € | |

*** Laŭ la regulo de la gastiganta domo en 2-lita ĉambro rajtas esti nur personoj de la sama sekso. Sekve, se venas geedza paro, tiu tamen devas loĝi en malsamaj ĉambroj.**

## KONGRESEJO

Nia kongresejo estos Kolpinghaus, la studenta domo kiu situas en la centro de Graz. Je pied-distanco troviĝas urbaj vidindaĵoj, vendejoj, restoracioj.
Ankaŭ la Kongresejo de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto kiu okazos en Graz semajnon post nia kongreso troviĝas je pieddistanco de ĉ. 15'.




1-lita ĉambro



2-lita ĉambro

komunaj banejoj kaj necesejoj ekster la ĉambro



1-lita ĉambro kun propra banejo kaj necesejo



kuirejo je servo de loĝantoj





1-lita apartamento kun propra banejo/necesejo kaj kuirangulo







manĝejo

## ĜENERAJ INSTRUKCIOJ: BV. ATENTE LEGI

- La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo. Bv. Nepre sendi la kopion de la enpagilo.
- Por ĉiu persono necesas plenigi apartan aliĝilon.
- La aliĝkotizo ne estas transdonebla al alia persono.
- Ĉiuj aliĝintoj ricevos konfirmon pri la aliĝo informojn kiel atingi la kongresejon.
- La mendo de la kompleta kongresa servo estos traktata nur post la alveno de la NEPRA antaŭpago de 50% al la banka konto de IKUE.
- Reston de la sumo oni devas pagi al la banka konto de IKUE ĝis la 10-a de julio.
- Post la 10-a de julio eblas aliĝi, sed oni ne plu akceptas la mendojn por tranoktado kaj manĝoj en Kolpinghaus.
- Post la 10-a de julio eblos aliĝi al la komuna dimanĉa tagmanĝo.
- Se restos liberaj lokoj, post la 10-a de julio eblos aliĝi al la pilgrimo al Mariazell.
- La ĉambroj estas plene ekipitaj (ne necesas kunporti litaĵon aŭ mantukon).

**MALMENDOJ**

- por malmendoj de la loĝ- kaj manĝservoj oni devas observi la postulojn de Kolpinghaus:
- **MALMENDO ANTAŬ LA 30-A DE MAJO:**
  **estos redonita la antaŭpago minus 5,00 € por la administraj kostoj.**
- **MALMENDO ANTAŬ EKDE LA 31-A DE MAJO:**
  **estos redonita la antaŭpago minus 55,00 € (de kio 5,00 € administraj kostoj).**
- **MALMENDO ANTAŬ EKDE LA 24-A DE JUNIO:**
  **estos redonita la antaŭpago minus 75,00 € (de kio 5,00 € administraj kostoj).**
- **MALMENDO ANTAŬ EKDE LA 10-A DE JULIO:**
  **estos redonita la antaŭpago minus 105,00 € (de kio 5,00 € administraj kostoj)**
- **Gravas: malmendo devas atingi IKUE strikte laŭ la supra priskribo.**

- Se vi havas iujn malfacilaĵojn, ekz. pri marŝado aŭ simile, bv. tion nepre indiki.
- Same, se vi havas apartan dieton bv. klare indiki tion. En la kongresa manĝejo oni servas vegetarajn kaj veganajn manĝojn.
- La kongresa kotizo kaj la restkosto inkluzivas neniun asekuron.
- La virtualaj partoprenantoj anticipe ricevos la programon kaj ZOOM-ligilon.

▶ **Se vi aliĝis al la 111-a UK kaj deziras resti dum plia semajno en Kolpinghaus, bv. tion nepre mencii en la aliĝilo. Ni aparte kontaktos vin, se troveblos libera loko. Se la lokoj disponeblos, oni devos mendi servon (tranoktadon kaj manĝojn por la tuta UK-semajno. Ne eblas repago pro neuzitaj manĝoj.**

**La aliĝilon vi povas plenigi elektronike: https://mallonge.net/77_aligxilo**

**aŭ en .doc formo kaj sendi rete.**

**La retadreso por sendi aliĝilon/mendilon, kopiojn de pagoj, demandoj: ikuekongreso@gmail.com**

**Pagojn oni direktas al la banka konto de IKUE:**

**UNIONE INTERNAZIONALE CATTOLICA ESPERANTISTA IKUE**

**Via Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma, Italio**

**IBAN: IT26P0200802242000106694316**

**BIC: UNCRITM10MC**

**Indiko: kongreso de IKUE 2026**